# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k86.html



# Katalunofobio

Nº 86 Julion – oktobro de 2011

Redaktore

# Pri koncepto diskutebla kaj diskutata...

*Ŝajnas, ke la ne partoprenado de la Registaro de Hispanio en ia ajn milito memvole signifas, ke malamikoj de Hispanio povas agi eĉ en plej hispana urbo, Barselono, tute senpune.*

Hispanio estas pacema lando, sed estas momentoj, kiam oni ne plu povas silenti pri frenezaĵoj de samlandanoj.

Iom baldaŭ post la alveno de socialisma Prezidento Jozefo Ludoviko Rodriguez Zapatero, anstataŭ pakti kun la alia plej granda partio, li preferis pakti kun naciismaj partioj en naiva iluzio forbalai la duan plejvaste voĉdonatan partion, PP, kredante, ke pro tio dekstro malaperus el Hispanio. Sed tion ne sukcesinte, je la fino de sia mandato li konstatis, ke la monstron naciisman oni povas dresi nur per komuna agado de la du plej popolaj partioj el Hispanio, kiel sekve pruvigas la socialisma registaro en Vaskio, ebla nur pro apogo de PP al PSOE. Jen modelo sekvinda de venkonta registaro en venonta balotado je la 20-a de novembro.

Socialisma registaro de Hispanio, tamen, bedaŭrinde ne tiun sintenon havis je la komenco de sia regado, kiam nia Prezidento diris, ke *Hispanio estas koncepto diskutebla kaj diskutata*, kaj fakte eĉ lia parlamenta majoritato aprobis sensencan statŭton katalunan, kiu asertas, ke ***Katalunio estas nacio***.

Post tio venis dialogoj kun teroristoj sen ili forlasinte armilojn, kaj eĉ alta oficisto avertis la kernon de la ekonomia grupo de ETA ĝustatempe pri tio, ke polico estis ĵus arestonte ilin ĉe trinkejo Fajsan'.

Antaŭ kelkaj jaroj tio estus neimagebla, ĉar nur je 2000 ETA estis preskaŭ malaperinta danke al agado de polico kaj politikistoj.

Ne tiun situacion oni povos vidi denove, se la registaro ŝanĝas, ĉar ankoraŭ estas politikistoj en Hispanio kies ĉefa celo estas regi ĉiel ajn.

Io diras al mi, tamen, ke hispanoj ne amase komprenos ĉifoje, ke la bono de ĉiuj superas la bonon de *tiuj niaj*.

Oni diras, ke popolo estas saĝa. Eble la afero estas, ke ne estas popolo en Hispanio, nur urbetoj, kiuj sopiras al sendependa nacieco...

*Jesuo.*

## Somero kaj juneco

Antaŭ kelkaj jaroj la juneco de Francio diris ne: jen la jaro 1968.



Falis Franko, venkis la Socialista Partio, venkis la Popola Partio, venkis denove la Socialista Partio kun Zapatero kaj fronte al la krizo, la juneco de Hispanio diris "Ne!"

En alia landoj oni parolas pri la ¨Hispana revolucio¨, oni parolas pri la juneco, kiu dormas en parko kaj ili volas sanĝi la societon, ili volas demokration realan.

Tiu ĉi estas la nomo "demokratio reala"; sed ĉu ne ekzistas demokratio en Hispanio? Mi diras ke en Hispanio ja estas demokratio frankisma, ĉar partioj politikaj ne funkcias demokratie.

Antaŭ kelkaj jaroj en la partio Socialista estis elektado pri kandidato partia al estonta nacia balotado. Venkis eksministro Borrell, sed la estraro de la partio ne apogis lin kaj altrudis Almunjon, membro de la estraro antaŭa.

Venkis Almunjo sed malvenkis interna demokratio de la Partio Socialisma, ĉar en Hispanio partioj funkcias nun same kiel la franka partio, kio estas, laŭ mia eltrovo, deficito pri demokratio.

Kaj la juneco diris "Ne!", ĉar ili volas realan demokration, same kiel mi kaj ĉiu vera demokrato ankaŭ volas tion, kion oni ŝuldas al ni: realan demokration. For Alfonso Guerra! Vivu Montesquieu!

Juan Antonio Cabezos Martinez

# Katalunofobio



*Antaŭ kelkaj semajnoj, dum la nomita "Diada", aŭ "nacia" festotago de Katalunio, la 11-an de septembro, kelkaj hispanaj malamikoj de Hispanio bruligis la flagon de niaj komunaj lando, nacio kaj kulturo.*

Sed estas absurde, ke neniu pagos pro tio. Oni ne povas paroli "kontraŭnaciisme" eĉ en nenaciismaj etosoj, ĉar oni kutime admonas nin al "prudento" kaj "tion-oni-preferinde-ne-faru-kvankam-oni-pravas". Tio estas danĝera cedo al ĉantaĝo de perfortuloj, kiun oni ne plu povas permesi al si. Honestaj civitanoj sindemandas okaze de tio, kie estas la diversaj registaroj de Hispanio, kaj al kio utilas ili ĉiuj, kaj ĉefe kial tiuj mizeruloj ne estas en karcero.

Mi opinias, ke ja sufiĉas. Ju pli oni donas al naciistoj, des pli ili postulas. Tio estas la plej erara ago de la socialisma registaro dum la lastaj ok jaroj. Kaj tio estas danĝere eĉ, ne diri ĉefe, por naciistojj mem: se Katalunio sendependiĝus hodiaŭ, ĝi certe perdus la plej grandan parton de sia merkato, la ceteran Hispanion. Eble ĝi falus ekster Eŭropa Unio, ĉar ne estas penseble, ke Francio kaj Hispanio akceptos ĝin kiel novan membron, kaj sekve nur malsato kaj malriĉeco povas veni el tiu *genia* koncepto, sendependismo.

Multaj sendependistoj plendas, ke en la cetera Hispanio abundas ***katalunofobio***, tio estas, malamo al Katalunio. Ili konfuzas fobio al tiu regiono kaj fobio al sendependismo, kiu ja ekzistas en plej granda parto de Hispanio. Sendependismo vere ekzistas nur en la mensoj de politikistoj katalunaj kaj vaskaj, kaj parte en tiuj galegaj, kaj ili infektis komunan popolon, serĉante voĉdonojn. Ili tion farante profitas bedaŭrindan mensomalsanon en nia lando, kiu venas el

tempoj de diktatoreco de Franko: timo implikiĝi en politiko, kaj ankaŭ ia emo sekvi ordonojn de tiuj, kiuj regas de registaro. Ne ankoraŭ hispanoj larĝe komprenas, ke estas registaro je la servo de ili, kaj ne inverse. Ĉie oni aŭdas, ke oficistoj estas *je nia servo*, kio estas vere, kvankam ofte dirita al malĝusta homo, sed estus tre sana ekzerco da bazaj rajtoj, ke oni sentu tion kaj agu sekve rilate al politikistoj. Nun estas larĝa emo en interreto tiudirekte, kaj pro tio mi atendas grandan kvanton da sindetenoj en la balotado de la 20-a de novembro, sed tiu sinteno ankoraŭ ne havas sufiĉe da forto por persekuti juĝe al politikistoj, kiuj mensoge aŭ perforte pro sia ofico agis favore al si aŭ al siaj familianoj. Mi iam proponis al retumantoj, ke ni aldonu nian forton kaj monon al tiu celo, sed mi ankoraŭ ne ricevis respondon. Babilaĉi ne estas same kiel elspezi monon, eĉ se tio estas je la bono de ni ĉiuj. Ankoraŭ hispanoj ne moviĝas per si mem, sed nur desupre. Pruvo pri tio estas la konflikto pri la rabato pri salajroj al funkciuloj: sindikatoj bremsis malkontentulojn ĝis kiam la rabato venis al salajroj de sindikatistoj mem, kaj eĉ tiam ili havis nur unutagan strikon. Kiam Prezidantino de Madrida Komunumo, Esperanza Aguirre plialtigis la nombron da instruhoroj semajnaj po 20 po semajno en liceoj, koleraj manifestacioj okazis en tiu loko, sed ne en Andaluzio, kies istruistoj de kelkaj jaroj jam instruis po 21. Sindikatoj ricevas multe da mono de la Hispana Registaro, kaj en Andaluzio la komunuma registaro estas socialisma, same kiel tiu de la centra nacio.




Tio estas malsana situacio en nia lando: ne gravas, ke politikistoj faru malbonan politikon, ne gravas, ke li aŭ ŝi rabas aŭ estu malhonestaj, gravas, ĉu tiu politikisto estu *nia* ĉu *de alia* partio. Kaj la danĝero venas de tio, ke nuntempe oni ne konsideras ke esti hispana, kia ni ĉiuj estas, estas pli grave ol esti komunisma, dekstra, maldekstra, aŭ ia ajn, kaj oni insultas alipensanton kiel faŝisman aŭ totalisman, proklamante sin kiel tia tion dirante.

Tamen, tio ja havos koston. Teruran koston en la estonto. Se oni ne sentas sin hispana, se oni ne sentas sian hispanecon, oni ne povas esperi ion ajn bonan de hispaneco aŭ de Hispanio. Ekzemple, kiam maristoj de vaska fiŝkaptŝipo *Alakrana* estis kaptitaj de somalaj piratoj, ili ne petis helpon de la Vaska Aŭtonoma registaro, sed tiu de la tuta Hispanio liberigis ilin, laŭ mia opinio per hontinda pago de mono de tutaj hispanoj, ne vaskoj. Oni ne povas ne imagi, ke se Vaskio, aŭ Eŭskio, kiel ili preferas nomi sin, estintus sende-




pendaj landoj, ili ne havus la monon liberigi ilin, kaj piratoj mortigus ilin, por averti al estontaj *klientoj*, ke sia *negoco* estas serioza. Simile, estas grandaj katastrofoj, kiujn etaj sendependaj ŝtatoj simple ne povus solvi, sed nur la helpo de multaj aliaj ŝtatoj etaj. Sed etajn ŝtatojn oni estigas pro malsolidareco kaj egoismo, kaj sekve ili plej verŝajne ne atentos al malfeliĉo de najbaroj. Tamen se tiuj najbaroj estas civitanoj de la sama lando, oni ne povas nei helpon. Tio okazis dum la egan riverkreskon de Turia, en Valensjo, je 1957, kiam la tuta hispanaro iris amase helpi valensjanojn, aŭ pli ĵuse, kiam okazis la tragedio ekologia pro la frakasiĝo de la petrolŝipo *Prestige* en Galegio.

Sekve, oni konkludas, ke tiun katalunofobion katunistoj mem kulturas, kaj sukcese, por ke nekatalunaj hispanoj prifajfu en la estonto pri la problemoj de Katalunio, kiuj ja estos. Se tiam ĝi ankoraŭ estas parto de Hispanio, ili havos hispanan solvon. Se ili ne plu estas, kaj mi esperas ke ili ne estos aŭ cesu voĉdoni favore al sendependismaj partioj, najbaraj landoj prifajfos pri iliaj problemoj, kiuj ne plu estos niaj.

## *Mesaĝo por Krokodiloj*

Mi rimarkis, ke homoj kun ne sufiĉe da memfido ade parolas en sia denaska lingvo anstataŭ uzi Esperanton ĉe niaj renkontiĝoj ne oficialaj.

Koincidas ofte tio kun la fakto, ke ili ankaŭ ne bone regas sian propran lingvon. Tion mi konstatis pri la hispana kaj la angla en diversaj niaj renkontiĝoj laste.

Tamen, se oni devigus sin paroli nur esperante, oni baldaŭ konvinkiĝus pri la mala fakto, ke mastrumante Esperanton, denove venante en sian denaskan lingvon devige, pro la fakto ke oni devas paroli al neesperantisto, oni konstatus, ke oni pli bone regas ĝin, sian denaskan lingvon, kaj aldone, ke oni kreskis iom pli kaj persone kaj humane ĝuste pro tio.

# Vivu la Respubliko!

de Jesuo de las Heras Jimenez

## Se vi volas skribi al mi...

Vekiĝinte, la Soldato gustumis kvazaŭ li trinkintus pokalon da galsuko.

"Mi neniam gustumis kulerplenon de tio", li pensis, "sed certe ĝi devas gustumi tiel".

Post stari por kalkulo de fintago, li iris en malsanulejon armean. Flegisto donis al li pilolojn por malkreskigi sian malbonan digeston kaj adiaŭis lin per gesto.

La Soldato iris matenmanĝi venonttage en manĝejon grandan, kaj poste li iris al oficejo. Tiuepoke oni nomis "destino" favoran postenon, kiun oni trovis en armeservo por labori malpli. Tamen, li mem ne serĉis ĝin: oficeja serĝento venis en mian KOMPANION kaj demandis pri kiu scipovas tajpi. Nur li levis sian manon. Li estis ununura tajpisto inter ducent homoj. Li dubis, ĉu li eraris. Oni jam diris al li, ke en armeservo oni ne volontulu eĉ por manĝi.

Sed serĝento estis ĝentila, simpatia homo. "Tro multe por militisto", pensis li. Aŭ oni mensogis al li pri militistoj.

En la oficejo li trovis alian serĝenton, kiun baldaŭ oni promocios en brigadon, kaj tri aliajn tajpantojn pli, same kiel li, de la sama alvoko ol li mem.

"Mi neniam trinkis galsukon", li diris al si mem poste, inter du skribaĵoj En tiu oficejo oni ĉiam skribas paperaĵojn pri seninteresaj aferoj: oni donis "licencon", tio estas, feriojn, al unu, oni donas al alia medalon, kaj al iu tria ulo oni donacas iom pli da mono ĉar li deĵoras de pli da jaroj en la armeo, aŭ al kvara ulo oni liberigas pri la armeo ĉar li estas pli aĝa... Ĉio, ĉio estis stultaĵoj, kiuj tute ne rilatas al li aŭ al vivo sia. Sed li zorgis ne diri laŭte tion, kion li pensas. "Ne estas prudente", diris li. al li mem ofte.

La maljunulo, kiu regis la landon mortis subite, aŭ la afero estis subite anoncita, oni neniam scios. Poste oni dirus, ke lia agonio daŭrigis multe, aŭ ke li ja estis sanktulo... Sed La Maljunulo lasis testamenton. Li volis ĉion ligita, bone ligita. Li kaj oni kredis, ke post li venos diluvo, ke preferinde Dio kaptu nin konfesitaj.

Sed kekaj ne volis konefsi, eĉ se oni mortigu ilin.

Vaskoj, kiu estis en la bataljono, diris, ke ili ne pafus sur la popolon. Oni arestis ilin. Sed ili prifajfis. Unu el ili diris, ke en maljusta socio, la justa loko por

homo justa estas karcero. Plagiatinto. Li kopiis penson de amerika verkiisto Henri Thoreau. De la nordo de Ameriko, kiu estas la loko, kie homoj pensas. En la sudo oni sufiĉe okupiĝas plenigi sian ventron ĉiun tagon.

La Soldato inspektis sian fusilon. Li ŝatis havi ĝin en sia mano. Estis plezuro lerni pafi. "Tiel oni ne ĉasos min kiel kunikon", li diris al si. Ĉar estontis io grava. Li antaŭsentis tion.



La testamento de La Maljunulo diris tion tre klare: li lasis ĉion al heredinto. Homo kun sango blua. Oni nomi lin "La Mallonga".

Sed nenio okazis. Oni garisonigis ilin dum monatoj. Oni diris, ke partioj politikaj prenontis la torĉon. Sed ili ne havis kojonojn, tio estas, kuraĝon. Neniu volis sian vizaĝon frakasita.

En ĉefurbo estis multe da kunvenoj inter partianoj de La Maljunulo kaj kelkaj anoj de partioj politikaj, kiuj kuraĝis veni el eksterlando. Sed aperis alia maljunulo. La Dua Maljunulo diris, ke li ne volas testamenton. Ke ĝi estu entombigita kun La Maljunulo. Ke la landon oni ne heredas. ke la lando estas ĉies.Y

Kaj li konvinkis popolon. Oni organizis amasosidadon, kiel tiuj de Gandhi. "Ni ne estos movitaj", ili kantaĉis sidante sub la lampo de stratoj. Sed estis tiom multe da homoj, ke ili okupis de unu al alia stratolampo, trairante la straton. Ĉiuj kun sia postaĵo sur la grundo. Aŭtoj ne povis pasi. Aŭtobusoj ne povis pasi. Panjoj estis koleraj: "Kiel porti la geinfanojn en lernejon?" "Tiel mi ne povos iri labori!", kriis ili akre. "Do fikiĝu!", diris sidantoj.

Kaj sidantete, sidantete, popolo venkis la pulson al notrarioj de La Maljunulo. Finfine oni dmandis ĉu ili volis la maljuni;aĵon, ĉu oni inventos ĉion de nulo. "Demokration", ili respondis. La afero de ĉiuj.

Kaj naskiĝis La Tria Respubliko.

La unua, oni diris, estis ridindaĉo. La dua, tragedio. La Tria povus esti komedio. Pro tio pri la feliĉa fino. Aŭ, plej derizinde, movo senfina. Sen fino. Nek feliĉa, nek malfeliĉa. Senmorta estato. Senmorta puno per demokratio al tuta popolo, kondamnita respekti unu la alian. Elteni. Klopodi ne surpaŝi la piedojn al aliaj homoj. Ĉar li aŭ ŝi estas kunposedanto de la publika afero tia.

Kaj La Soldato povis reveni en sian hejmon.

## *MAS*

Monda Asembleo Socia estas asocio fondita en la jaro 2005 de esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikolo de la gazeto *Le Monde Diplomatique* en Esperanto (http://eo.mondediplo.com), volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nun pere de retpoŝto kaj interreto. Ĝi partoprenas en la monda kaj laŭeble regionaj forumoj kaj referencas en sia statuso por sia agado tekstojn kunigitajn en la libro *Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj*. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

MAS estas fakasocio kunlaboranta kun UEA.

Ĝia retejo, ***http://mas-eo.org***, enhavas ĉiujn interesajn informojn por MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉia membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado — ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas de la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen ĝis nun eldoniĝis jam 66 librojn, kies plej rimarkindaj estas la Unua Volumo de ***La Kapitalo***, de Karlo Markso, kaj ***Tertrema katastrofo de Japanio***, Taglibro, de Jasuo Hori.

## *CELOJ*

1 MAS havas la celon defendi tutmonde la interesojn de la homaro. MAS plenumas sian celon en Esperanto, en permanenta interreta asembleo -en la sekvo nomata "asembleo"-, certigante al ĉiuj siaj membroj partoprenon en la diskutoj kaj en la decidoj laŭ la principoj de bazdemokratio kaj kompleta travidebleco por ĉiuj membroj.

2 La MAS-anoj agas por la paco en la mondo kaj klopodas por disvolvi —komencante ĉe si mem— eksternacian pens- kaj ag-manieron home solidaran. Ili strebas kontribui al starigo de mondvaste senklasa socio, do al socio sen ekspluatado, socio kiu respektas la dignon de siaj membroj sen distingo de aĝo, haŭtkoloro, sekso, seksa orientiĝo, etna aŭ nacia aparteno kaj kredo - socio kiu organizas sian ekonomion laŭ la bezonoj de ĉiuj siaj membroj, protektante la planedon Tero por estontaj generacioj.

3 La MAS-anoj laboras por nova socia ordo, en kiu la libera evoluo de ĉiu individuo estas la bazo por la libera evoluo de ĉiuj. Ili diskutas en MAS por precizigi siajn celojn kaj trovi interkonsentajn vojojn por atingi ilin, ankaŭ kunlabore kun mondaj kaj regionaj sociaj forumoj, surbaze, interalie, de propraj analizoj kaj aliaj analizoj, ekzemple tiuj de Le Monde diplomatique. Ili apogas kaj aktive uzas la internacie validajn progresemajn tekstojn kiel ekzemple tiun pri la homrajtoj.

4 MAS celas servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celoj estas analogaj al tiuj de MAS ; peri kaj ĉiel helpi al kreado de literaturo (originaloj kaj tradukoj) kaj aŭdvida materialo spegulanta la idealojn de MAS. Ĝi alstrebas kiom eble plej amikajn rilatojn de kunlaborado kun sam- kaj simil-celaj Esperanto-organizoj.


## Kopenhago UK96:

# Dialogo inter generacioj

Lastan someron mi finfine venis en vikinga lando Danio. La plej multekosta lando, kiun mi jam vizitis. Ankaŭ mi trovis kelkajn kulturajn apartaĵojn, kiujn mi ne komprenis. Estas Danio lando da vicanoj. Oni vicas por ĉio, eĉ por demandi, ĉu oni povas manĝi krom drinki en ejo. Tio nmi ne ŝatis.

Antaŭ la komenco de la kongreso mi atingis la ĉefurbon unu tagon, kaj post diskuti kun la hotelakceptistino, ĉar oni donis al mi saman nokton en hotelo dufoje pro eraro, mi finfine solvis tiun absurdan problemon revendante ĉambron al muzikisto, por kiu oni ne mendis ĉambron. Kaj veninttage mi iris el hotelo mia al tiu amuzaspekta, kongresa hotelo, Bella Center Hotelo, kies presenco anoncas ventumilo giganta. Ĝi konsistas el du konstruaĵoj konektitaj de du tuneloj: unu granda je la unua etaĝo, kaj alia en la antaŭlasta, kiu irigas onin en drinkejo, el kie oni povas ĝui panoramian elrigardo pri la ĉefurbo de Danlando.

Unu grava ero de la Kongreso estis sendube la diskutoj pri




ties temo: ***Dialogo inter generacioj***. Mi povus pensi pri kelkaj aliaj pli taŭgaj temoj diskuti en la ĉefurbo de Danio, kiel ekzemple, *Kiel vi iras, Eŭropo?*, aŭ *La vero pri Vikingoj*. Iam ajn mi komprenos kiu kaj kiel, ne diri kial, oni elektas la temojn de kongresoj de UEA. Tamen, eĉ tiun temon oni povas konsideri interesa, se oni zorgas, ke la diskutoj estos sufiĉe vivaj kaj sufiĉe bone organizitaj. Mi devas konfesi, ke mi estis nur en unu diskutejo inter kelkaj geesperantistoj diversaĝaj, kaj junaj kaj maljunaj, kiuj deko-



mence prezentis plendojn pri la aĝo unu la aliajn. Ĉe la apuda foto oni povas vidi la kunvenon el mia vidpunkto. La zorgantino de la diskutejo, dekstre, baris kelkajn temojn, kiel ekzemple tiu pri la eŭropeco aŭ neeŭropeco de Esperanto, flankotemo sufiĉe enriĉiga pri la diskuto, tamen se klarigo pri tio postulus multe pli da tempo ol ni havis por diskuti la temon mem. Ne estis sufiĉe klara konkludo, sed venis en nian argumentaron tio, kio okazos pri kluboj de Esperanto, kiam gejunuloj ne prenos la torĉon kaj subtenos ilin per zorgado pri la libroj kaj aliaj havaĵoj, kiujn oni tiom pene sukcesis kolekti en tiuj lokoj laŭ la jaroj. Junaj homoj opinias, ke ĉio estas pli bone en la reto, eĉ kongreso mem! Tamen, en kongresa balo mi ŝercdemandis belulinon kiel ŝi povus danci tie tra la reto, trovante koleran eksplikon, ke mi *ne bone komprenis* ŝin!, kvamkam ŝi ne klarigis al mi pri tio, kion ŝi celis diri. Pli malmultekoste estas *kongresumi* per la reto, kompreneble, eĉ se nur *virtuale*, sed tio estas, same kiel, laŭ mia eltrovo, defendi pertelefonan konversacion kontraŭ kap-al-kapan, sub la pretekstο, ke la konversaciantoj sidas pli komforte hejme. Ambaŭkaĝoaze estas vere, ke jes, ĝi estas pli komforte, sed ankaŭ pli malvarme kaj erarige. Je la fino de la diskutado mi konkludis, ke la genujuloj de hodiaŭ estos la gemaljunuloj de morgaŭ, se ili estas sufiĉe bonŝancaj, ĉar la gejunuloj de morgaŭ malfeliĉe jam estos mortintaj, kaj sekve, tiu debato estas denaske falsa, ne diri absurda. Kaj tragike estas, ke tiam, kiam la nunaj gejunuloj ne plu emos aŭ povos vojaĝi, ili denove devos krei klubojn el nenio..., aŭ forgesi pri Esperanto, kio estos multe plu malgaja sorto ol tia de nunaj maljunuloj, ne por Esperanto, sed por ili mem. Bedaŭrinde, ne tielprofunde ni diskutis, kaj sekve niaj konkludoj ne tuŝis tiujn flankojn de la temo.

Kio okazis en kunvenoj de KATEO estas io, pri kio mi ne certas, ĉar mi ne ĉeestis ĝiajn kunvenojn. Mi iris nek al budo en la Movada Foiro nek partoprenis

la diskutojn en la kunveno de ATEO, kiel lastan jaron mi faris, pro malinterkonsentoj kun la prezidanto de la asocio pri la koverto de la lasta bulteno, ***Ateismo***. Mi estis invitita ekssprese iri kaj klarigi pri miaj kaŭzojn rezigni pri la redaktado de la bulteno, sed mi preferis ne tion fari, kaj ne iris, ĉar mi emas nek diskuti nek bremsi la agadon de tiu asocio, kiun mi helpis rekrei dum kelkaj jaroj.



Sed mi devas protesti pro tio, ke la Movada Foiro anstataŭas la pli valoran, laŭ mi, Interkonan Vesperon, kiu ĉiam okazis unuatage dum la kongresoj ĉu internaciaj, ĉu universalaj, ĉu naciaj, eĉ regionaj, pri kiu mi konas. Eble oni povas fari ambaŭ aferojn, sed s***e oni devas elekti, mi voĉdonas por I***nternacia Vespero***, ĉar tiumaniere oni povas interkonatiĝi kun la aliaj geesperantistoj*** la unuan tagon de la kongreso.

Dekstre oni vidas fieran flagon nian flirtantan laŭ la vento, apud vagono, kie okazis muzikan recitalon de diversaj gekantistoj esperantaj apud la marbordo, proksime de la urbocentro. Ni devis iri per metroo, kaj poste preni aŭtobuson kaj finfine marŝi al Cabinn Metro hotelo, kiu kuŝas je dek minutan promenadon de Bella Center Hotelo, kie ĉio okazis.

La moŝta sinjoro Prezidanto de UEA diris interesan prelegon je la malfermo de la UK, per kiu li diris, ke tradukanto aldonas ĉiam valorojn al teksto, kaj sekve same kiel la francoj diras, ke *Se io ne estas klara, ne estas franca*, ni povas diri, ke *Se tio ne estas gastama, ĝi ne estas esperanta*. Aldone li prezentis vortoludon inter gastamo kaj gastronomio: simfonio de gastamo venas per du movoj: tiu de kuirarta gastiganto regalema kaj tiu ĉi de ĝissate manĝanta gasto.

Ankaŭ mi ĝuis la citaĵon de George Steiner: *Arboj havas radikojn, sed homoj havas krurojn per kiuj foriri post konscienca decido diri* ***ne***.





Fama institucio pri Kopenhago kaj Danio ĝenerale estas la fama Sirenido, kantita de Hans Christian Andersen.

Tamen, anktaŭ kelkaj jaroj vandaloj trancis kaj forportis la kapon de tiu sirenido, kaj la urboregistaro decidis anstataŭigi ĝin de tiu nova skulptaĵo.

Malfeliĉe, ĉi tiu ne estas la sama, kiun Andersen Kantis...

## La Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo de Katalunio

# Malgrat de Mar




Foto: Remy Bouchet

La unuan de oktobro mi venis, post deko da jaroj, al la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, organizita de samideano Luis Serrano. Ĉijare la semajno okazas en Malgrat de Mar (rekta traduko el la kataluna lingvo: *malbonvolo de l' maro* pro tio, ke la unuaj homoj, kiuj venis ĉi tien estis prizonuloj en karcero, kiun oni kreis ĉi tie), kiu nun estas plej suna kaj agrabla urbeto ĵus apud la maro. Nia hotelo kaj kongresejo estas nomita *Cartago Nova*, nomo kiu estas tre kara al homoj de Mursjo, pro tio, ke nia dua plej larĝa urbo havas la saman nomon, Cartaĥena, kiu devenas el latina Cartago Nova, nomo kiun romianoj donis al *Qart Hadaŝt*, la urbo fondita de Hanibal', kiam li trairis nian duoninsuolon vojaĝante al Italio volonte detrui Romon.

Sed nur pacon kaj ripozon venas el etoso, kiun mi trovis en tiu ĉi urbo apude de la Mediteranea Maro. Mi venis per trajno, kune kun amiko de Alikanto, S-ro Kanet', kaj kune intermiksiĝis kun samideanoj el Francio, Litovio, Belgio kaj eĉ Andaluzio. Krom aliaj partoj de Hispanio, krom-

preneble inkluzivante tiuj el Katalunio mem.

Min ŝokis la malbona novaĵo, ke samideano Santjago Torne' i Graŭ suferis iktuson, kaj pro serioza sekvo ne povas partopreni, eĉ viziti la kongreson, kaj eĉ ricevi viziton. Mi ege deziras, ke li baldaŭ resaniĝos kaj ni povos ĝui lian ĉeeston venontjare je la plibonigo de ĉi tiu aparta aranĝo en la nordorienta parto de Hispanio.

Mi komencas verki ĉi tiun rakon-teton pri la Semajno merkredon, fakte je la mezo de la staĝo, ĵus venante de la tuttaga ekskurso al Sabadeljo, la plej esperanta urbo de Katalunio, kie ne nur estas strato dediĉita al nia majstro, D-ro Zamenhof, sed ankaŭ monumento al li ĉe tiu strato mem, kaj ankaŭ al grava gramatikisto S-ro Ludoviko Mimo'. Ni ankaŭ vizitis muzeon arban, kaj revenis kun animo plenplena da amikeco kaj karamadeco.

Hieraŭ ni ankaŭ faris ekskurson al pitoreska urbeto Hostalrich, kie ni vidis muzean vilaĝon kaj ĝuis varman etoson esperantan. Posttagmeze ni ĉeestis la kurson pri Esperanto por progresintoj instruate de Stano Marĉek', fama redaktoro de la revuo **Esperanto**, la organo de UEA. Nokte kelkaj el ni ĉeestis operon ***Turandot***, de Ĝakomo Puĉini.

Laŭ la tuta semajno ni ĝuas, krom la menciitan kurson pri Esperanto, diversajn prelegojn, inter ili pri *Tondado da arboj*, *Vojaĝado laŭ la mondo*, *Kiel scientistoj nomiĝas vivajn estaĵojn* aŭ *La Esperanto-Civito*, krom debatoj pri diversaj temoj, kiel *Ĉu Esperanto estas artefarita lingvo*, kaj eĉ *Ĉu la semajno funkciis bone*.

La venontan jaron ni denove povos ĝui Internacian Esperanto-Semajnon Kulturan kaj Turisman en alia urbo de Katalunio. Mi esperas revidi vin tie, kaj se vi, leganto, ne venis, mi invitas vin veni ĝui afablan etoson kaj fruktodonan paroladon per Esperanto cele al amikeco inter diverskulturanoj.




# La faraono

Ĉapitro 32ª

Tagmeze antaŭ la palaco aperis Hiram, en simpla portilo, portata de ok malriĉaj egiptanoj, al kiuj li donacis almozon. Ĉirkaŭis lin eminentaj feniciaj komercistoj kaj la sama popolamaso, kiu ĉiutage staris antaŭ lia domo.

Ramzes kun miro salutis la maljunulon, de kies okuloj brilis la saĝo kaj de la tuta figuro seriozeco. Hiram portis blankan mantelon, sur la kapo oran ringon. Li salutis la princon kun memestimo kaj, levinte la manojn super lia kapo, diris mallongan benon. La ĉeestantoj estis profunde kortuŝitaj.



Kiam la vic-reĝo montris al li apogseĝon kaj ordonis al la korteganoj foriri, Hiram ekparolis:

—Hieraŭ, la servisto de via ekscelenco, Dagon, diris al mi, ke vi bezonas cent talentojn. Tuj mi sendis miajn kurieristojn en la urbojn Sabne-Ĥetam, Sethroe, Piuto kaj aliajn, kie haltas la feniciaj ŝipoj, ke ili elŝipigu ĉiujn komercaĵojn. Kaj mi pensas, ke post kelke da tagoj via ekscelenco ricevos tiun ĉi malgrandan sumon.

—Malgrandan!— interrompis la princo kun rido, —Vi estas feliĉa, via nobleco, se vi nomas cent talentojn malgranda sumo!

Hiram balancis la kapon.

—La avo de via ekscelenco—, diris li post pripenso, —la eterne vivanta Ramesses-sa-Ptah honoris min per sia amikeco; mi konas ankaŭ lian sanktecon vian patron (li vivu eterne) kaj mi eĉ provos prezenti al li mian respekton, se oni allasos min...

—Kiel tia dubo?—, interrompis la princo.

—Ekzistas tiaj—, respondis la gasto, —kiuj unujn allasas, aliajn ne allasas al la persono de l' faraono, sed tio estas indiferenta. Via ekscelenco ne estas kulpa, mi do kuraĝos fari al vi

unu demandon, kiel malnova amiko de via avo kaj patro.

—Mi aŭskultas vin.

—Kion tio signifas—, diris malrapide Hiram, —kio tio signifas, ke la kronprinco kaj vic-reĝo devas prunti cent talentojn, kiam al lia ŝtato oni ŝuldas pli ol cent mil talentojn?

—Kiu?

—Kiel, kiu? La aziaj popoloj, kiel tributon. Fenicio ŝuldas al vi kvin mil, kaj mi certigas, ke ĝi redonos ilin, se ne okazos io neatendita. Sed, krom tio, Izraelo ŝuldas tri mil, filistinoj kaj moabitoj po du mil, ĥetoj tridek mil... Fine, mi ne memoras la detalojn, sed mi scias, ke la tuto egalas cent tri, aŭ cent kvin mil talentojn.

Ramzes mordis la lipojn: sur lia vivplena vizaĝo oni vidis senfortan koleron. Li mallevis la okulojn kaj silentis.

—Tio do estas vera!—, eksopiris subite Hiram, fikse rigardante la vic-reĝon. —Tio do estas vera? Malfeliĉa Fenicio, sed ankaŭ Egipto...

—Kion vi diras, via nobleco?—,



demandis la princo, sulkigante la brovojn. —Mi ne komprenas viajn plendojn.

—Vi scias, princo, pri kiu mi parolas, se vi ne respondas mian demandon—, respondis Hiram kaj leviĝis kvazaŭ for foriri. —Malgraŭ tio mi ne reprenas la promeson. Vi havos, princo, cent talentojn.

Li salutis tre humile, sed la vic-reĝo devigis lin reokupi la seĝon.

—Via nobleco ion kaŝas de mi—, diris li per voĉo, en kiu oni sentis ofendiĝon. —Mi volas, ke vi klarigu al mi, kia malfeliĉo minacas al Fenicio aŭ al Egipto?

—Ĉu vi ne scias pri tio, via ekscelenco?, —demandis Hiram kun ŝanceliĝo.

—Mi scias nenion. Pli ol unu monaton mi pasigis en la templo.

—Ĝuste tie oni povis ekscii pri ĉio...

—Via nobleco diros al mi!—, ekriis la vic-reĝo, batante la tablon per la pugno. —Mi ne amas, kiam oni sin amuzas je mia kosto.

—Mi diros, se via ekscelenco donos al mi grandan promeson, ke vi tion perfidos al neniu. Kvankam..., mi ne povas kredi, ke al vi, la kronprinco, oni ne sciigis...

—Ĉu vi ne fidas al mi?—, demandis la princo kun miro.

—En ĉi tiu afero mi postulus promeson de la faraono mem, —respondis firme Hiram.

—Mi do ĵuras je mia glavo kaj je la standardoj de nia armeo, ke mi

parolos al neniu pri tio, kion vi komunikos al mi...

—Tio sufiĉas—, diris Hiram.

—Mi aŭskultas.

—Ĉu vi scias, princo, kio nun okazas en Fenicio?

—Eĉ pri tio mi ne scias!—, interompis kolere la vic-reĝo.

—Niaj ŝipoj—, murmuretis Hiram, —el ĉiuj partoj de l' mondo rapidas al la patrujo, por transporti, post unua signalo, la loĝantaron kaj la riĉaĵojn ien..., trans la maron..., okcidenten.

—Kial?

—Car Asirio devas preni nin sub sian regadon.

La princo eksplodis de rido.

—Vi freneziĝis, respektinda homo!—, ekkriis li. —Asirio prenos Fenicion! Kaj kion diros ni? Ni —Egipto?

—Egipto jam konsentis.

La sango alfluis al la vizaĝo de l' kronprinco.

—La varmego malklarigas viajn pensojn, maljunulo—, diris li al Hiram per trankvila voĉo. —Vi eĉ fortesas, ke tia afero ne povas fariĝi sen la permeso de l' farono kaj... sen la mia!

—Ankaŭ tio venos. dume la traktaton faris la pastroj.

—Kun kiu? Kiuj pastroj?

—Kun la ĉefpastro ĥaldea, Beroes, rajtigita de la reĝo Assar—, respondis Hiram. —Kaj kiu de via flanko? Mi ne povas diri tute certe, sed ŝajnas al mi, ke iliaj ekscelencoj Herhor kaj Mefres kaj la sankta profeto Pentuer.



La princo paliĝis.

—Atentu, feniciano—, diris li, —ke vi kulpigas pri perfido la plej altajn estrojn de la ŝtato.

—Vi eraras, princo, tio tute ne estas perfido: la plej alta ĉefpastro de Egipto kaj la ministro de lia sankteco havas la rajton trakti kun la najbaraj monarĥoj. Cetere, de kie vi scias, ke ĉio ĉi ne estas farata laŭ la volo de l' faraono?

Ramzes devis konfesi, en la animo, ke tia traktato ne estus ŝtata perfido, sed nur pruvo, ke oni malŝatis lin, la kronprincon. Jen kiel agas kun li la pastroj, kun li, kiu eble post unu jaro estos faraono?

Jen kial Pentuer mallaŭdis la militojn, kaj Mefres subtenis lin!

—Kiam tio okazis? Kie?—, demandis la princo.

—Ŝajnas, ke oni faris la traktaton nokte, en la templo de Set en Memfiso—, respondis Hiram. —Kaj kiam? Mi ne scias bone, sed ŝajnas, ke en la tago, kiam via ekscelenco forlasis Memfison.

"Kanajloj!", pensis la vic-reĝo. "Jen

kiel ili respektas mian rangon! Ili do trompis min ankaŭ per la priskribo de la stato de l' regno? Iu bona dio vekis miajn dubojn en la templo de Hator..."

Post momento de interna batalo li diris laŭte:

—Tio estas ne ebla! Kaj mi ne kredos al viaj vortoj, ĝis vi ne donos pruvon.

—La pruvo estos—, repondis Hiram. —En unu el la plej proksimaj tagoj venos Pi-Baston granda asiria sinjoro, Sargon, amiko de l' reĝo Assar. Li veturas sub preteksto de pilgrimado al la templo de Astoret, li oferos donacojn al vi, princo, kaj al lia sankteco, kaj poste vi faros la traktaton. En la realo vi nur sigelos tion, kion decidis la pastroj por la ruino de Fenicio kaj eble eĉ por via propra malfeliĉo.


—Neniam!—, diris la princo. —Kian kompencon Asirio devus doni al Egipto!

—Jen estas parolo inda de l' reĝo: kian kompencon ricevus Egipto? Ĉar por la ŝtato ĉiu traktato estas bone, se ĝi nur ion profitas per ĝi... Kaj ĝuste tio mirigas min—, daŭrigis Hiram, —Ke Egipto faros malbonan negocon: Asirio prenas, krom Fenicio, preskaŭ la tutan Azion, kaj al vi, kvazaŭ favore, lasas: izraelidojn, filistinojn kaj la duoninsulon Sinai... Kompreneble, en tia okazo la tributoj, ŝuldataj al Egipto estos perditaj kaj la faraono neniam ricevos la cent kvin mil talentojn.

La vic-reĝo skuis la kapon.

—Vi ne konas—, diris li, —la egiptajn pastrojn: neniu el ili akceptus tian traktaton.

—Kial? La fenicia proverbo diras: pli bona estas hordeo en la grenejo, ol oro en la dezerto. Estus do eble, ke Egipto sentante sin malforta, preferus senpage Palestinon kaj Sinai, ol militon kontraŭ Asirio. Sed jen kio surprizas min... Ne Egipto, sed Asirio estas hodiaŭ facile venkebla: ĝi havas malpacon nord-oriente, posedas malgrandan kaj malbonan armeon. Se Egipto atakus ĝin, ĝi prenus la sennombrajn trezorojn de Ninivo kaj Babelo kaj por ĉiam plantus sian regadon en



Azio.

—Vi do vidas, ke tia traktato ne povas ekzisti—, interrompis Ramzes.

—Nur en unu okazo mi komprenus tion, se la pastroj..., dezirus nuligi la reĝan povon en Egipto. Cetere, ili celas al tio de l' tempoj de via avo, princo.

—Ree vi parolas sensencaĵojn—, intermetis la princo, sed en la koro li eksentis maltrankvilon.

—Eble mi eraras, —respondis Hiram, atente rigardante liajn okulojn. —Sed aŭskultu, via ekscelenco...

Li alŝovis sian seĝon al la prico kaj parolis per mallaŭta voĉo:

—Se la faraono proklamus militon kontraŭ Asirio kaj gajnus ĝin, li havus grandan armeon adorantan lian personon, cent mil talentojn da antaŭaj tributoj, ĉirkaŭ ducent mil talentojn de Ninivo kaj Babelo, fine ĉirkaŭ cent mil talentojn de la venkitaj landoj. Tia riĉaĵo permesus al li repagi la bienojn, kiujn li donis al la pastroj kiel pruntgarantion, kaj por ĉiam meti finon al lia sinmiksado en la regnan povon.

La okuloj de Ramzes brilis. Hiram daŭrigis.

—Hodiaŭ, kontraŭe, la armeo dependas de Herhor, sekve de la pastroj, kaj, esceptinte la eksterlandajn regimentojn, la faraono ne povas kalkuli je ĝi. Krom tio, la trezorejo de l' faraono estas malplena kaj la pli grand parto de liaj bienoj apartenas al la temploj. La reĝo, eĉ nur por la kortegaj elspezoj, devas ĉiujare fari novajn ŝuldojn; kaj ĉar fenicianoj ne estos plu ĉe vi, vi devos preni de la pastroj. Tiamaniere post dek jaroj lia sankteco (li vivu leterne) perdos la reston de siaj bienoj, kaj poste?

Sur la frunto de Ramzes aperis ŝvitaj gutoj.

—Vi do vidas, nobla sinjoro—, diris Hiram—, ke nur en unu okazo la pastroj povus, eĉ devus, akcepti plej malhonoran traktaton kun Asirio: se ili celus mallevi kaj nuligi la povon de l' faraono. Tamen, povas ekzisti ankaŭ alia kaŭzo: se Egipto estus tiel malforta, ke ĝi bezonus pacon je ĉiu prezo.

La princo salte leviĝis.

—Silentu!, ekkriis li. —Mi preferus la perfidon de plej fidelaj servistoj, ol tian malfortecon de la lando! Egipto devus cedi al Asirio Azion... Sed post unu jaro ĝi mem falus sub ĝian juĝon; ĉar subskribante sian honton, ĝi konfesus sian senfortecon.

Li paŝis bolante, kaj Hiram rigardis lin kun kompato, aŭ simpatio.

Subite Ramzes haltis antaŭ la feniciano kaj diris:

—Tio estas malvero! Iu lerta fripono trompis vin, Hiram, per ŝajna vero kaj vi kredas al li. Se ekzistus tia traktato, oni farus ĝin en plej granda sekreto, kaj en tia okazo unu el la kvar pastroj, kiujn vi citis, estus perfidulo ne nur de la reĝo, sed eĉ de siaj kunuloj.

—Povis ja esti iu kvina, kiu spionis ilin—, intermetis Hiram.

—Kaj li vendis la sekreton al vi?

—Ŝajnas al mi strange, ke vi, princo, ne ekkonis ankoraŭ la pontencon de l' oro.

—Sed pripensu, via nobleco, ke niaj pastroj havas pli multe da oro ol vi, kvankam vi estas riĉulo super la riĉuloj!

—Mi tamen ne koleras, se venas al mi draĥmo. Kial ili forpuŝus talentojn?



—Ĉar ili estas servistoj de l' dioj—, diris la ekscitita princo, —ĉar ili timus ilian punon.

La feniciano ekridis.

—Mi vidis multajn templojn en diversaj landoj, kaj en la temploj malgrandajn kaj grandajn statuojn. Sed diojn mi neniam renkontis.

—Blasfemulo!—, ekkriis Ramzes. —Mi vidis dion, mi sentis sur mi lian manon kaj aŭdis lian voĉon.

—Kie tio estis?

—En la templo de Hator: en ĝia vestiblo kaj en mia ĉelo.

—Tage?, demandis Hiram.

—Notke—, respondis la princo kaj ekmeditis.

—Nokte vi aŭdis la parolon de l' dioj kaj sentis ilian manon—, ripetis la feniciano, skandante la vortojn. —Nokte oni povas vidi multajn aferojn. Kiel tio estis?

—Mi estis kaptata en la templo je la kapo, brakoj kaj kruroj, kaj mi ĵuras...

—Pst!—, interrompis Hiram kun rideto. —Oni ne devas ĵuri senbezone.

Li obstine rigardis Ramzeson per siaj penetremaj kaj saĝaj okuloj, kaj vidante ke en la junulo naskiĝas duboj, li diris:

—Mi diros ion al vi, sinjoro. Vi estas nesperta, ĉirkaŭita per reto de intrigoj, kaj mi estis amiko de viaj avo kaj patro. Mi faros al vi unu servon. Venu iam nokte en la templon de Astoret, sed..., promeso konservi la sekreton. Venu sola, kaj vi konvinkiĝos, kiaj dioj alparolas kaj tuŝas nin en la temploj.

—Mi venos—, diris Ramzes post pripenso.

—Antaŭsciigu min, princo, iun matenon, kaj mi diros al vi la vesperan signalvorton de la templo kaj oni enlasos vin. Sed ne perfidu min, nek vin—, diris la feniciano kun bonkora rideto. —La dioj iafoje pardonas la perfidon de siaj sekretoj, la homoj neniam.

Li salutis la princon, kaj poste levinte supren la okulojn kaj

manojn, komencis murmureti benon.

—Hipokrito!—, ekkriis la princo. —Vi preĝas al la dioj, je kiuj vi ne kredas?

Hiram finis la benon kaj diris:

—Jes, mi ne kredas je la dioj egiptaj, asiriaj, eĉ feniciaj, sed mi kredas je la Sola, kiu ne loĝas en temploj kaj ties nomo estas konata.

—Niaj pastroj ankaŭ kredas la Solan—, intermetis Ramzes.

—Ankaŭ la ĥaldaj, tamen tiuj kaj la aliaj kunĵuris kontraŭ ni. Ne ekzistas vero en la mondo, mia princo!

Post la foriro de Hiram, la princo sin ŝlosis en la plej malproksima ĉambro sub preteksto legi sanktajn papirusojn.

Preskaŭ fulme en lia fajra fantazio ordiĝis la novaĵoj kaj formiĝis plano.

Antaŭ ĉio li komprenis, ke inter la pastroj kaj fenicianoj brulas batalo pri la vivo kaj morto? Kompreneble, pro la influo kaj trezoroj. Hiram diris veron, ke se fenicianoj forlasus Egipton, ĉiuj bienoj de l' faraono, eĉ de l' nomarĥoj kaj aristokrataro transirus en la manojn de l' pastroj.



Ramzes neniam amis la pastrojn kaj de longe sciis kaj vidis, ke la pli granda parto de Egipto apartenas al la pastroj, ke iliaj urboj estas la plej riĉaj, kampoj plej bone kulturataj, loĝantaro kontenta. Li komprenis ankaŭ, ke la duono de iliaj trezoroj savus la faraonon el la senĉesaj klopodoj kaj relevus lian povon.

La princo tion sciis kaj ne malofte parolis maldolĉe pri tio. Sed kiam dank' al Herhor li estis nomita vic-reĝo kaj ricevis la korpuson de Memfiso, li paciĝis kun la pastroj kaj en la propra koro estingis la malnovan malkonfidon al ili.

Hodiaŭ ĉio ĉi revekiĝis.

Do la pastroj ne nur ne diris al li pri la traktato kun Asirio, sed eĉ ne antaŭsciigis pri la baldaŭa alveno de l' ambasadoro, de iu Sargon?

Eble ĉi tiu afero estas plej alta mistero de la temploj kaj ŝtato. Sed kial ili kaŝis de li la sumon de la tributoj, ŝuldataj al Egipto de diversaj aziaj popoloj? Cent mil

talentoj, tio ja estas sumo, kiu tuj povus rebonigi la financan staton de l' faraono! Kial ili kaŝis tion, pri kio sciis tira princo, unu el la membroj de l' konsilantaro de ĉi tiu urbo?

Kia homo por li —kronprinco kaj vic-reĝo—, ke nur fremduloj malfermas al li la okulojn!

Sed estis ankoraŭ pli malbona afero: Pentuer kaj Mefres per ĉiuj rimedoj penis pruvi al li, ke Egipto devas eviti militon.

Jam en la templo de Hator tia insistado ŝajnis al li suspektinda: la milito ja povis liveri al la ŝtato centojn da miloj da sklavoj kaj pligrandigi la bonstaton de la lando. Hodiaŭ ĝi ŝajnas tiom pli necesa, ke Egipto devas repreni ŝuldojn kaj akiri novajn tributojn.

La princo apogis la kubutojn sur la tablo kaj kalkulis:

"Oni ŝuldas al ni", pensis li, "cent mil talentojn da tributoj... Hiram pensas, ke rabinte Baibilonon kaj Ninivo, ni kolektus ducent mil, kune tricent mil per unu fojo. Per tia sumo oni povas pagi la kostojn de plej granda milito, kaj restos kiel profito kelkcento da miloj da sklavoj kaj cent mil talentoj da jara tributo de la venkitaj popoloj. Poste", finis la princo, "ni reguligus niajn kalkulojn kun la pastroj!"

Ramzes brulis da febro. Tamen venis al li konsidero:

"Kaj se Egipto ne povus venke batali kontraŭ Asirio?"

Sed ĉe tiu ĉi demando la sango ekbolis en li. Kiel, Egipto? Egipto ne sukcesus piedpremi Asirion, se antaŭ la armeo stariĝus li, Ramzes, li, la posteulo de Ramzes Granda, kiu sola sin ĵetis sur la militajn ĉarojn de Ĥetoj kaj pecetigis ilin!"

La princo povis kompreni ĉion, esceptinte tion, ke li povus esti venkita, ke li povus ne elŝiri la venkon de plej grandaj potenculoj. Li sentis en si senliman kuraĝon kaj ekmirus, se iu ajn malamiko ne forkurus, vidante liajn galopantajn ĉevalojn. Sur la ĉaro de l' faraono staras la dioj mem por ŝirmi lin per ŝildo kaj trapiki la malamikojn per ĉielaj sagoj!

"Sed..., kion tiu ĉi Hiram parolis pri la dioj?", pensis la princo. "Kaj kion li volas montri al mi en la templo de Astoret? Ni vidos".



*Astoret, patrino de la dioj en prakulturoj.*

# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetotekolanti.com/hale/k86.pdf


## Enhavo


Redaktore............................2

Parolas la Prezidanto........3

Katalunofobio....................4

Vivu la Respubliko!..........8

MAS....................................10

Kopenhago:UK96..........11

La XIXª IESKT..............14

La Faraono, ĉ32ª.............16


**Kovrilo:** Katalunistoj ofte plendas, ke estas kampanjo kontraŭ ili fare de hispanaj naciistoj, kio ajn tio estas.

Sed pro agoj kiel tiu, kiun oni montras en nia kovrilo, ili ja flegas tiun sentojn kontraŭ ili inter la ceteraj hispanoj.


**Prezidas: Johano A. Cabezos.**
**Redaktas: Jesuo de las Heras.**

**Korektas: Jozefo Pina.**

**Retskribu al: kajeroj@gmail.com**


Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro, ne la redakcio. Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo ne mistraktu personon.

Abonu en konto La Caixa:

2100 4617 41 2200115275

kaj poste **diru al ni per mesaĝo.**

**Tute verkita kaj kompilita per senpagaj linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer, Gimp kaj Scribus.**


**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.**

ISSN 1697-6460